TUTŜTATA KONSULTA KOLEGIO ESPERANTISTA EN ĈEĤOSLOVAKIO - TKKE-ĈSR ESPERANTISTA RONDETO EN OLOMOUC ESPERARTISTA JUNULARO EN OLOMOUC

---

Olomouc, dato de poŝtstampilo.

Karaj samideanoj, estimataj amikoj,

Kiel ni jam bedaŭrinde devis al vi sciigi, la Tutŝtata Esperantista konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en Olomouc (20. -21. X. 1956) ne povis okazi. Ministerio de lernejaferoj kaj kulturo sendis al prezidanto de TKEE leteron, datitan la 19-an de sept. , kun jena teksto:

"Ĉar montriĝis, ke pritraktado de la propono por principa solvo de la problemoj de E-movado en kompetentaj organoj daŭros pli longtempe ol oni supozis, ni postulas vin, ke vi aranĝu prokraston de la konferenco de Esperantistoj kunvokita per TKKE en urbon Olomouc. Ĝian daton ni interkonsentos post eldono de la principa decido. Mi petas vin, ke vi afable prizorgu, ke ĉiuj invititoj estu informitaj pri la prokrasto de dato de la konferenco." Subskribita Ant. Richter, p.m. Post antaŭa pritraktado subordiĝis TKKE je deziro de la ministerio kaj decidiĝis prokrasti la konferencon je pli posta dato.

Kvankam LKK dissendis al ĉiuj aliĝintoj kaj eksterlanden cirkuleron kun tiu-ĉi informo, tamen ricevis TKKE kaj LKK 66 salutleterojn kaj telegramojn el 24 landoj: UdSSR 10, Germana Demokrata Respubliko 6, Pollando 6, Bulgario 4, Ĉinio 4, Svedujo 4, Aŭstrio 3, Francujo 3, Hungarujo 3, Anglujo 2, Hispanujo 2, Islando 2, Italujo 2, Japanujo 2, Jugoslavio 2, Rumanujo 2, Izraelo 1, Kanado 1, Maroko 1, Nederlando 1, Portugalujo 1, Uruguaio 1, Usono 1. Al ĉiuj samideanoj kaj E-kluboj, kiuj sendis salutleterojn, ni elkore dankas kaj certigas ilin, ke TKKE faros ĉion, por ke plej baldaň la Konferenco efektiviĝu kaj ke ĝi alportu decidojn, favorajn al Esperanto-movado en ĈSR.

Al la Konferenco aliĝis el Ĉeĥoslovakio 726 delegitoj kaj eksterlandaj gastoj el UdSSR, Ĉinio, Pollando, Hungario, Bulgario, Rumanujo, Jugoslavio, Germana Demokrata Respubliko, Aŭstrio Vietnamo, Nederlando kaj Svedujo.

El aliĝintaj eksterlandaj samideanoj vizitis Ĉeĥoslovakion delegitoj el Ĉinio, delegitoj el Bulgario kaj el Hungarujo.

Ĉina delegito, s-ano Yeh Chun-Chien, kiu forflugis el Pekino la 16-an de okt. vizitis la konferencurbon, kaj estis gasto de E-klubo en Olomouc. La 20-an de okt. li estis akceptita de urbestro de la urbo Olomouc k-do Ant. Eliáš en historia urbdomo en ĉeesto de urbestro-anstataŭanto Černý, de sekretario de TKKE M. Rudolf kaj de anoj de LKK Hlobilová, Kubáčová kaj Všolek. Urbestro, k-do Eliáš persistis en amika interparolado kun s-sno Yeh Chun-Chien pli ol unu horo kaj poste li ebligis al ĉina gasto trarigardon de historiaj ejoj de gotika urbdomo kaj ankaŭ li ĉeestis edziĝfeston, kiu ĵus okazis en nova ceremonia salono. Posttagmeze okazis preskonferenco, dum kiu respondis s-ano Yeh Chun-Chien kelkajn demandojn, kiuj rilatis Esperanton.

Vespere araanĝis E-klubo amikan kunvenon en klubejo en Smetana-parko, kiun partoprenis kun ĉina gasto ankaŭ hungara delegito s-ano Dernöi. TKKE kaj E-klubo en Olomouc dankas al Registaro de Ĉina Popola Respubliko, al Ĉina Esperanto Ligo, al ĝia prezidanto s-ano Hujutz, kaj al Hungara Konsulta Komitato Esperantista por elsendo de iliaj delegitoj. Samtempe estis en Praha bulgaraj delegitoj kaj prezidanto de HEKK s-ano J. Baghy kaj sekrerario de HEKK s-ano L. Márten, kiuj poste (23.X.) venis al Olomouc.

La ĉina, bulgaraj kaj hungaraj delegitoj partoprenos Esperantistan Kongreson en Varsovio (28.X. 1956ú, kiun ili salutos en la nomo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, al kiuj ne estos eble ĝin partopreni.

Kvankam TKKE ne sukcesis realigi ĉi-jare la planitan Konferencon, ne signifas tio, ke ni ne klopodos tion realigi venontjare, ĉar 1957 estas jubilea jaro. En 1932, do antaŭ 25 jaroj, okazis en Olomouc la V-a Tutŝtata Esperanrista Kongreso.

El Olomouc ni salutas ĉiujn, kiuj sendis al ni salutleterojn, ĉiujn, kiuj nin subtenis kaj ni petas Vin karaj samideatoj, restu niaj fidelaj amikoj!

Ĉiuj salutleteroj kaj telegramoj estos uzitaj en Esperanto-ekspozicio en Olomouc kaj ankaŭ en aliaj urboj kune kun varia E-propagandmaterialo.

| Por TKKE: | | Por E-Klubo Olomouc kaj LKK: | |
|---|---|---|---|
| Josef Vítek,<br>prezidanto | Miloš Rudolf<br>sekretario | Dr. Vl. Mohapl,<br>prezidanto | J. Karhan<br>sekretario |

Okaze de la Konferenco aranĝis Esperantista Junularo en Olomouc Leter-vesperon. La grupo ricevis 37 leterojn el 15 landoj: el Germana Federacia Respubliko 6, Hispanio 7, Italujo 6, Nederlando 3, Francujo 2, Hungarujo 2, Norvegio 2, Nova Zelando 2, Belgujo 1, Danlando 1, Irlando 1, Jugoslavio 1, Pollando 1, Svisu jo 1, Usono 1.

Anoj de EK en Olomouc dankas al ĉiuj sanideanoj, kiuj sendis al la Letervespere salutojn.

Por EJ – Olomouc:

| | |
|---|---|
| Břetislav Nevrlý,<br>grupestro | Marie Kubáčová<br>sekretariino |

KIO NOVA EN ĈSR?

**PRAHA:** La 22-an de okt. aranĝis E-klubo ĉe OB 2 en Praha vesperon de Hungara-ĉeĥoslovaka amikeco. Ĉeestis Julio Baghy kaj membroj de hungara kultura delegitaro kaj ĉeĥoslovakaj oficialaj gastoj.

**OLOMOUC:** Scíencaj libroj en Esperanto! Fama ĉeĥoslovaka sciencisto univ. prof. D-ro Josef Augusta plenrajtigis s-anon Miloš Rudolf, kiu ankaŭ science laboras en lia fako, traduki sciencajn verkojn de D-ro Augusta en Esperanton. Post angla kaj germana tradukoj, kiuj estas preskaŭ jam disvenditaj sekvos esperantlingva traduko de verkoj, kiuj priskribas la plej novajn sciaĵojn de evoluo de kreitaro kaj homaro en pratempo. La verkoj enhavos dokumentajn fotografiojn kaj ankaŭ pentraĵojn de akademana pentristo Zdeněk Burian.

**BYSTŘICE POD HOSTÝNEM**: Okaze de la I-a Internacia semajno de muzeoj (International Campaign for Museums) okazis en Bystřice p. H. ekspozicio: "Esperanto – internacia lingvo de paco kaj ĝia unua ĉeĥoslovaka pioniro Theodor Čejka".

**ZNOJMO:** E-klubo en Znojmo aranĝas E-ekspozicion en la ejoj de Kleriga domo en Znojmo.

Kvindekjaran vivjubileon festas niaj karaj samideanoj Jiří Kořínek (1.10.) en Brno kaj Pavel Rosa (9. 10.) en Bratislava. Ni kore gratulas!

R E P R E S O EN EKSTERLANDAJ GAZETOJ KAJ REVUOJ

P E T A T A ! ! !

Eldonis LKK kaj E-klubo ĉe Hosp. podnik města Olomouce, Olomouc, R.A.2. ĈSR